

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 10 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

3-a Kvaronjaro 1981

N° 80

Ĉu Esperantistaro ekzistas en nia Regiono ? Ĉu ĝi legas sian Bultenon ? Ĉu vi iam intencas partopreni ĝin ?

TRE MALAGRABLAN NOVAĴON NI BEDAŬRAS SCIIGI AL VI :

Nia amikino, D-ino VIERNE, Prezidantino de la E-a Grupo en Montpellier suferis pri malfeliĉa akcidento. La 12an de septembro, ŝi falis en sia domo kaj rompiĝis femuroston.

Ni prezentas al ŝi niajn sincerajn dezirojn pri ŝia baldaŭa kaj rapida resaniĝo kaj la repreno de ŝia sindonema agado en nia Federacio. Skribu multnombre al ŝi : 5, Rue du Docteur Roux, Montpellier.

De unu duondeko da jaroj mi ricevas S.F.S. kaj mi konis, per ĝi, la nomon de deko (eble nur seso) da samideanoj.

En regionaj kunvenoj kaj kongresoj, mi renkontis entute tridekon da ili, ĉiam la samajn ! Tamen, oni diris al mi, ke estas 180 kotizpagan-
toj por S.F.S. Ĉu ne interesatoj ? Ĉu ne kontraŭstarantoj ? Kial do pagi?

Tiuj, kiuj kuraĝas skribi al vi pere de SFS estas malmultaj; do kompreneble ili skribas longe : necesas plenigi la bultenon !

Sed ĉiuj pli ŝatus interrilatojn eĉ mallongajn. Ĉu tio estas malfacilaĵo, mallonge skribi ? Fidu al ni ! Ni aperigos viajn "romanojn" en sekvotaj tranĉaĵoj ! Eku do !!!

C.H.M.

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!

Aperigontajn artikolojn ricevas S-ino MOUNIER (C.H.M.), 17, Avenue De Lattre de Tassigny, 30000 NIMES, antaŭ la fino de novembro.

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!

Ni memorigas al vi la proponitajn, ne devigajn temojn :

- Pri minoritaj lingvoj;
- Kiel vekti intereson de gejunuloj al nia lingvo kaj movado ?

En la lasta S.F.S. aperis artikolo de nia Samideano VALO kun prezeraro

t.e. : " Vortoj de (F)raŭlo" anstataŭ de " (P)raŭlo" .

Kvankam ankaŭ fraŭlo povas esti praŭlo, tio fakte ne aplikigas al la aŭtoro, kies senkulpigon ni petas ; cetere la teksto mem tute ne atestis pri (F)raŭleco. Certe vi mem korektis .

LA AŬTUNA LABORKUNVENO OKAZOS LA 11-an de OKTOBRO en VALRAS en
CENTRE CULTUREL , Rue Thérèse, Allée de la République :

Petu pliajn precizojn de viaj grup- responduloj .

nimes

Post Nacia Kongreso : DEBATO (Unua "Ŝtono")

PRI MINORITATAJ LINGVOJ

Ĉar mi ĉeestis, dum la Nacia Kongreso, en laborkunveno, en kiu oni pri-traktis minoritatajn lingvojn kaj ĉar mi apartenas al tiu plimulto, kiu scipovas nur tiun aĉan premantan lingvon, (mi ankaŭ lernis la anglan, kompreneble, kaj la araban, ŝtegis ilin, sed ilin forgesis), mi decidis skribi mian opinion. Kial tiam mi parole ne intervenis en la debato ? Fakte, jes, mi devus, ĉar nur unu samideano kuraĝis tion fari, kaj S-no Henin, kiu prezentis statistikojn malpravigantajn pa "por-istoj" de la asembleo ; sed mi konfesas, ke paroli en ESPERANTO abrupte kaj longe mi ankoraŭ ne kapablas : ofte mia lango stumblas kaj fuŝas miajn pensojn.

Sed nun, skribante, ĉu mi estos pli lerta ?

Nu ! Pri minoritataj lingvoj, en Francio, estas nekontesteble, ke oni trudis la francan lingvon al diversaj regionanoj. Ĉu ne okazis bedaŭrinda malestimo por la regionaj lingvoj ?-Certe ja ! Ĉu tio estis la sola solvo por ebligi la Unuiĝon de Francio ?-Sendube ne ! Sed fakte tio okazis. Kaj nun ? Ĉu dezirinde revigligi la diferencojn ?- Jes !...kiam la homoj mem sentas tiun bezonon retrovi antikvan identecon pri sia gento. Pro tio la regionaj lingvoj estu (ili ja estas) elekteblaj en la lernejoj, sed ne devigataj, ĉar multaj regionanoj tute ne scipovas sian lingvon kaj eĉ ne deziras relerni ĝin : mi konas kelkajn Provencanojn en nia urbo, kiuj iom rememoras la Provencan Lingvon kaj neniam provis legi "Mistralo-n" en la propra teksto, kvankam ties verkoj sin ofertas tute libere sur bretoj de publikaj bibliotekoj. Ĉu oni devigu ĉiujn NE Provencanojn aŭ Okcitananojn loĝantajn en Nîmes lerni tiujn lingvojn ? Kiu el la du ?-Oni ne certas. Ĉu la infanojn de enmigrintaj familioj ? Ĉu mi, kiu naskiĝis eksterlande, en Algerio de kie oni forpelis min, (eble prave !) ? Ankaŭ miaj gepatroj kaj eĉ geavoj naskiĝis tie. Ili estis Vaskaj, Ardeŝaj, Daŭfenejaj kaj Parizaj ! devenintoj kaj parolis kaj instruis al mi nur la francan lingvon, kiun mi ŝategas . Kien mi devis "rehejmiĝi" ? Kie estas mia lullando ? Ĝi estas Francio ! Ĉu mi devas senti min fremda en mia propra lando ? Jen por la sentoj .

Nun, praktika vidpunkto. Ĉar mi estas (kaj ne la sola !) ŝtatoficistino, oni povas enpostenigi min en kiu ajn urbon. Kio okazas al Hispanoj, Svisoj, Belgoj en tia kazo ? Kio okazus ĉe ni, se, kiel postulis iu nia Hispan-Kataluna Samideano, ĉiuj minoritataj lingvoj fariĝus egalrajtaj al la oficiala ? (Li eĉ asertis, ke Hispanio sin montris, laŭ tiu vidpunkto, pli demokrata ol Francio, ĉar eĉ Franco ne sukcesis forigi la katalunan lingvon) ; eble la kialojn oni devus pli profunde analizi. Do, ni, kiel ŝtatoficistoj, alveninte en iu urbo, ni enskribigus niajn infanojn en lernejon, kie ili lernus pere de la....Kataluna lingvo, ekzemple. Post du, tri aŭ kvar jaroj,

LA POEMO DE RODANO

F R E D E R I C M I S T R A L

el la Provenca Originalo , Esperantigis R . L A V A L (VALO)


Rimarko de la tradukinto : La " Poemo de Rodano " estas la sola verkita de M i s t r a l en senrimaj versoj .

La manuskripto de la traduko estas kontrolita de Samideanoj Michel DUC - GONINAZ, Akademiano, kaj Marcel JULLIEN, provenclingvano, en Aikso -la- Provenca .

.....

En unu tia nokto de varmego,
Dum subtegoloj oni sufokiĝis,
Ŝi en ĉemiz' eliris sub la luno
Por ĝui l'eksteran freŝan aeron.
La lun' en sia pleno ŝin rigardis
Sveltega, malsupreniri al bordo,
Nudpiede, en la silent' profunda
De la vastega naturo dormanta.
Sonis en ĝi l'rondako de Rodano,
Lumetis sur la herbo lucioloj ;
La najtingaloj, tie malproksime,
Ameme interrespondis en l'aŭboj, (1)
Kaj la plaŭdeto de l'akvo kurema
Ride aŭdiĝis. La eta knabino
Lasis defali sian ĉemizeton,
Kaj en Rodanon, arde, tremante,
Lante, klinita kun manoj krucitaj
Sur la trem' de siaj du virgaj mamoj,
Eniris. Ĉe l'unua fridosento
Ŝi haltis momenteton, suspirante,
Kaj emociite turnis l'okulojn
Ĉiudirekten en ĉirkaŭo nigra,
Ĉiam kredante, ke inter la arboj
Iu rigardas al ŝi senvestita.
Poste, ek ! En la flu' de l'akvo mola
Ŝi plu malsupreniris, lumigata
De la lunaj radioj, kiuj kisis
Ŝian fajnan kolon, la sukcen-brunan
Junan karnon, siajn pufetajn brakojn,
Ŝian fortikan dorŝon, siajn lumbojn
Kaj la mametojn firmajn, harmoniajn,
Duonkaŝitajn kiel du turtetoj
En disa fluo de ŝia hararo.
Plej eta bru'-fiŝ, kiu ekster l'akvo
Por muŝon kapti, faras eksalteton,
Kirla funel' subite glutglutanta,
La akra krio de rato-flugila (2)
Aŭ bato de tabano sur folio
Kvazaŭ kazee turnis ŝian koron.

Ŝi plu descendis. Ŝi, ĝis la talio,
Poste pli alte, sin sentis vestita
Per la luksa mantelo de l'rivero,
Kaj pensis nur pri la ĝua feliĉo
De sia tuta korpo enmiksita,
Kunmiksita kun la granda Rodano.



...../.....

Sub la pied', tiel milda la sablo !
 Ŝviteto, sento de tepida freŝo
 Envolvis sin per ĉarm' neesprimebla.
 Ĉe haŭtsupraĵo, ĉe karnosupraĵo,
 Milde, la turnigado de la ondo
 Faris al ŝi kisetajn kaj tikletajn
 Kun la murmur' de dolĉegaj paroloj,
 Kiuj al ŝi havigis plezur-spasmojn....

- (1) Aŭbo : Blanka popolo (populus albus)
 (2) Rato flugilhava : Vesperto

...../.....

PRI MINORITATAJ LINGVOJ....(Sekvaĵo)

pro nia profesio, ni translokiĝus kaj jen la infanojn oni instruus pere de la....Bretonia ! Kiom da lingvoj ni mem devus scipovi ? En plurlingva lando, por vivi siajn proprajn popolojn, la Regionoj devas esti sufiĉe vastaj kaj riĉaj aŭ...sendependaj. Iu Hispan-Kataluno cetere agnoskis, ke kelkaj regionaj agadoj celas fakte al apartiĝo, al sendependeco. Mi tute konsentas pri tio, sed Ve ! Povra Mi ! Kiu akceptus min ? Ĉar mia franca lingvo fariĝus minoritata en ĉiuj Provincoj !


Kaj pri Eŭropo, kaj pri Mondo ? Ĉar ni estas Esperantistoj, ĉar mi estas Mondcivitanino, ni pripensu la aferon. Ĉu ESPERANTO fariĝos premananta lingvo kiel fariĝis la franca ? Tute ne, ni evitu tian gravan eraron ! Facila estas la solvo, ŝajnas al mi ; ankaŭ vi scias tion ! Ĉiu Homo scipova, kaj tiucele devige (memvola devigo) lernu du lingvojn : la plej oportunan laŭ la nacia vidpunkto, kaj Esperanton, la plej facila, por internaciaj rilatoj ; tiele, ni domaĝos niajn proprajn kulturojn. Eĉ pli feliĉaj estos tiuj, kiuj plie scipovos siajn minoritatajn lingvojn ! Ju pli da kulturoj, des pli da riĉeco !

Kaj kiel fari, ke iu, (tion spertis nia franca Samideano, kiu parolis en la kongresa salono), ne sentas sin ĝenata en fremda regiona butikoj, ekzemple, kie aliaj personoj parolas intersian lingvon ? Ŝajnas al mi demando de ĝentileco (ankaŭ internacia lingvo tiukaze helpus !) : Oni instruis al mi NE paroli lingvon nekonatan de unu sola ĉeestanto ! Ĉu ankaŭ al vi ?

Denaske Franca parolantino ,
 Multregiona devenantino .

C.H.M.

RESTU ĈIAM PRUDENTA





ĈU ESPERANTO

POVAS DIALEKTIĜI ?

Persono iam mire petis de W. AULD, kial li estas esperantisto, ĉar estas fakto, ke la angla estas LA internacia lingvo .

"Mi tre amas mian lingvon kaj tro suferas, kiam mi aŭdas ĝin kripligita de alilandano". (citita laŭmemore).

Tre certe ankaŭ al vi kaŭzas aflikton ĉa misa traduko de la franca fare de alilandanoj.

El multaj ekzemploj kolektitaj de mi, jen :

Aux Dossiers de l'Ecran, à propos des otages américains un ex-ambassadeur des USA : " Je trouve la situation mou ."

Indira GANDHI au "Téléphone sonne" : " Je ne suis pas en mesure de croyer ou de ne pas croyer si....." (= croire)

Tout récemment, la soeur du Shah à la radio : " La France est bien connue pour son hospitalisation " .

Et même l'écrivain anglo-belgo-sino HAN SUYIN, lors d'une conférence à MONTPELLIER : - On a détourné le fleuve " jusqu'à ce qu'il y avait de multiples canaux " .

Enfin, beaucoup de congressistes se souviennent, à ATHENES, d'avoir couché dans une " étudiante cheminée " (foyer d'étudiantes) .

Multaj el tiuj eraroj fontas el la naciaj lingvoj de tiuj diversaj personoj.

Ni parolu pri NI , Esperantistoj. Ĉu ni povas aserti, ke ni estas imunaj kontraŭ la influo de nia nacia lingvo ? Evidentas, ke NE, absolute ne !

Kiom da Francoj konfuzas "bazaro" kaj "merkato", "se" kaj "ĉu" kaj eĉ "ke" kun "kiun" ?

Sed ekzistas io ankoraŭ pli grava . Tiun eraran "merkato" mi trovis : en artikolo de Italo, en turisma prospekto pri Zagreb, ankaŭ same en turisma prospekto pri Madrid !

Kio povas esti la reago de franca lernanto, kiu denature emas uzi "merkato" legante tiujn prospektojn ? Nue ke : "merkato" estas la ĝusta vorto !

Jen falsa vorto eniras en la lingvon !

Estas ja konata fenomeno, ke eraro fariĝas regulo ; tiu fenomeno estas normala en evoluo de la lingvoj .

Kvankam Esperanto estas lingvo kiel la aliaj, ĉu oni lasu la erarojn ensteliĝi en ĝin, ĝis la eraroj fariĝos regulo ?

Eĉ, se efektive tio kelkfoje okazis (ekz : Sati kun la senco de ami .) estas memkompreneble, ke oni devas bremsi, eĉ kontraŭstari tiun fenomenon !

La lingvo evidente povas, devas evolui. Sed la kriterioj de evoluo estas de longe agnoskataj, nome : la uzado ĉe la bonaj aŭtoroj .

Se citi nur unu ekzemplon : PIRON (VALANO) kontribuas al tiu evoluo.

Ni memoru :

" NE SUFIĈAS NOMI LINGVON TUTMONDA POR KE ĜI ESTU TIA " (Z.)

LENTAIGNE

V O R T L U D O

D E M A N D O : Kiam vespo pikas vin sendolore, kion vi devas respondi ?

R E S P O N D O : Bonan vesperon !

(El "Verda Kato")

Klarigo : Tial, ke ERO de la vespo, t.e. la pikilo, restis en la svelinta mano.

Eŭropa Esperanto-Centro

Sekretariato de Eŭropa Esperanto-Unio

Montoyerstr. 37 b. 24
1040 BRUSELO

13.7.81

MERKREDE, LA 8 AN DE JULIO WILLY BRANDT PLEDIS ANTAŬ LA EŬROPA PARLAMENTO EN LUKSEMBURGO POR LA MALPLIIGO DE LA NOMBRO DE LABORLINGVOJ EN LA SESIOJ DE LA EŬROPAJ INSTANCOJ.

Tiu evento estas des pli grava kaj stranga, ĉar ĝuste germana social-demokrato proponis tiun solvon.

Unue, estas ĝuste la Germanoj kiuj ĉiam defendis sin kontraŭ atenco al la egalrajto de ĉiuj lingvoj en la Eŭropa Komunumaro. Tio okaze de la - ĝis nun neniam oficialaj - proponoj doni avantaĝojn al la plej "gravaj" lingvoj franca kaj/aŭ angla.

Aliflanke la limigo al nur kelkaj naciaj lingvoj estus tiel nedemokrata ke tio neniam rajtas okazi. Aliaj solvoj devas esti trovataj por nuligi la hodiaŭaj lingvaj problemoj.

La Eŭropaj instancoj ja reprezentas ĈIUN Eŭropanojn, kaj la principo de la egalrajto postulas ke neniu lingvogrupo estu diskriminaciata.

Fakte, la statutoj de la Eŭropa Komunumaro mem - almenaŭ ĝis nun - garantias ke neniu nacia lingvo havu privilegiojn.

NECESAS REAGI

La Eŭropa Esperanto-Centro jam faris tujan paŝon, sendante telegramon al Willy Brandt por protesti kontraŭ nedemokrataj proponoj koncerne la lingvozon en E.K.

Ni ankaŭ gratulis la nederlandajn eŭroparlamentanojn Jonker kaj van den Heuvel, kiuj tuj protestis kontraŭ la eldiroj de Brandt. (Ankaŭ la germanaj kristandemokratoj vigle reagis).

NI DEMANDAS AL LA AKTIVAJ EUROPAŬOJ

reagu ĉe la koncernaj instancoj

Eŭropa Parlamento
Plateau du Kirchberg
L-Luksemburgo

Bonvolu eviti esperantistajn simbolojn kaj sloganojn - oni neniam scias ĉu eventuala antaŭa kontrolo/eliminado okazos.

NI PETAS AL LA ESPERANTLINGVA GAZETARO

sciigu la esperantistojn pri tiu evento, tio ja vere koncernas ĉiujn Eŭropanojn. Ĝuste nun, kiam la (espereble vere taŭga) laborgrupo "Patterson" klinos sin super la problemoj kaj CIUJ eblaj solvoj, ni reagu kontraŭ nedemokrataj kaj neefikaj solvoj.

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication: Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal : 3^{ème} Trimestre 1981

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes